# AVANCO

1/96

Januaro-Aprilo
(VII-a jaro, Nro. 3)

Oficiala organo de Kuba Esperanto-Asocio

## E N H A V O

NI NE RAJTAS SILENTI! 4
*Julián Hernández Angulo*

ALVOKO AL ARTA KREADO 6
*Juan Lázaro Besada Toledo*

HAVANO VOKAS! 7
*Maritza Gutiérrez González*

AGU, NE PLORU!
*Norberto Díaz Guevara*

SUKCESOPLENAJ 8-9
*Alexis Otero Castellón*

AMERIKO KONGRESIS EN KOSTARIKO 10-11
*Versio el informo de Atilio Orellana*

ETE ISAJ-OSAJ 12
*La Redaktoro*


Jen, nia historio
DE KEA AL KEA 13-15
*Juan Ramón Rodríguez Gómez*

Deziras korespondi 16
*La Redaktoro*

ESTIMATAJ:

Salutegon geamikoj!
La nova Nacia Estraro vin salutas. Post Kongresa k. Komitata tajdo, jen la unua nro. de 1996. Ĉi Avanco inkluzivas mesaĝon de l' la KEA-Prezidanto, raportojn pri la plej gravaj eventoj nacie k. kontinente, artikolojn, komentojn kaj multon plian...
Fruktodonan legadon deziras via redaktoro,

Alexis



Kuba Esperanto-Asocio

## NACIA ESTRARO

***Julián Hernández Angulo**
Prezidanto. Atentas plenumon de ĉefaj taskoj k. la opajn fakojn.

***Maritza Gutiérrez González**
Ĝenerala Sekretariino. Kontrolas la internan agadon de la stabo.

***Alberto Gabriel Rodríguez Pineda**
Financoj. Flegas administradon de la Centra Oficejo.

***Héctor Jiménez Batista**
Instruado. Atentas ILEI-Sekcion.

***Juan Ramón Rodríguez Gómez**
Internaciaj k. Publikaj Rilatoj. Flegas Historion kaj Libroservon.

***Pedro Fernández Rodríguez**
Kulturo. Prizorgas artajn kaj klerigajn aranĝojn.

***Alexis Otero Castellón**
Informado. Cefredaktoras en Avanco, Noktuo k.Universo.

Komisiitoj

***Martha Alonso**
Kultura kunordigo.

***Juan Lázaro Besada Toledo**
Atento al verkistoj.

***Alberto García Fumero**
Scienco kaj tekniko.

***Miguel A. González**
Membroj subtenantoj.

Havano, VII-a jaro, nro. 3 (1/96, jan.-apr.)/Aperas tri foje jare/ Eldonas Kuba Esperanto-Asocio/PF.: 5120; 10500 Havano, Kubo/Telefonnumeroj: 40-1364 k. 40-4484/Fakso: 53 733 87 29/ Ĉefredaktoro: Alexis Otero Castellón/Grafika aranĝo kaj kunredakto: Juan Ramón Rodríguez/Kunlaboris: Maritza Gutiérrez, Julián Hernández, Juan Lázaro Besada, Norberto Díaz, Atilio Orellana, Alberto Rodríguez/Prezo: 1.00 CUP (enl.), 2.00 NLG aŭ 2 irk. (eksterl.), pagendaj al KEA-konto ĉe UEA: keaux-u/ Subskribitaj artikoloj esprimas la opiniojn de ties aŭtoroj/ Ĉiuj rajtoj rezervitaj/Reproduktado permesata (Bv. indiki la fonton kaj sendu du ekzemplerojn al la Redakcio).

# Ni ne rajtas silenti!

## SALUTMESAĜO DE LA KEA-PREZIDANTO*

Kiam nova jaro alproksimiĝas oni ĉiam pensas pri la atingoj kaj mankoj de la jaro finiĝonta kaj faras plej diversajn planojn surbaze de esperoj, revoj, ambicioj, ktp.. Tio fakte motivigas nin pli forte labori kaj agi tiel ke ĉiuj planoj realiĝu.

Kuba Esperanto-Asocio deziras ke ĉiu kuba esperantisto kaj ĉiu membro de la internacia E-komunumo havu sufiĉan sanon, energion kaj optimismon por solvi ĉiajn problemojn tiel ke 1996 alportu al ni ĉiuj sukceson kaj progreson.

Ni konsciu ke ni, kiel membroj de granda familio devas helpi unuj la aliajn, ĉefe en malfacilaj momentoj ĉar nur tiamaniere ĉiu el ni sentos la veran valoron de la Asocio al kiu ni apartenas, kaj almenaŭ ion faros por ke la movado pli avancu kaj progresu. Ne decas ke ni preteratentu detalojn kiam temas pri atento al nia esperantistaro.

Malgraŭ la ofte menciitaj ekonomiaj malfacilaĵoj, kiujn ni kubanoj alfrontas, 1995 estis por KEA persukcesa jaro: ni gvidis regulajn, superajn kaj korespondan kursojn, Komitatkunsidis en provinco Camagüey, renkontiĝis naciskale kvarfoje, seminariis nian instruistaron kaj okazigis sciencteknikan aranĝon SAEST´95.

Krome, ni radioelsendis E-programojn, vizitis provincojn, partoprenis internacian foiron de ling-

*Avanco inkluzivas tiun ĉi saluton novjaran nun ĉar estas ĝia unua numero en 1996. Ne forgesu ke oni eldonas ĝin fine de aprilo kaj ties reproduktado okazas jam maje. (N.R.)*

voj kaj kulturoj, profitis la amaskomunikilojn por disvastigi nian agadon, eldonis bultenojn, ekbeletris, kongresis en Tampereo kaj eĉ pretigis tridekon da aktivuloj por la internacia ekzameno, kio finfine ne okazis.

Tamen, ni konscias ke multe pli devas fari por disvastigi Esperanton tra la tuta lando, cele al reteno kaj plialtigo de nia membraro kaj por ke pli k. pli da esperantistoj fariĝu aktivuloj kaj motoroj en nia movado.

Novaj kaj gravaj taskoj atendas nin dum 1996. Inter ili, la plej grava, nia Dua Nacia Kongreso kaj ni devos klopodi sukcesigi ilin ĉiujn.

Ni laboru por ke pli da kubanoj konatiĝu kun Esperanto; por ke nia esperantistaro perfektigu la lingvo-uzon kaj utiligu nian karan lingvon sciencteknike, beletre, komunikcele, ktp.. Nur tiel ĉiuj povos konstati la veran valoron de Esperanto.

Nome de la Nacia Estraro, kiu p o s t du monatoj finos sian unuan oficperiodon, laŭ la nova asocia statuto, mi deziras ke ĉiu opa esperantisto sentu sin pli feliĉa dumjare kaj ke la lumo de Esperanto pli brilu en nia sunplena lando kaj en nia kontinento.

Ni ne rajtas silenti... niaj idealoj estas ja trezoraj kaj indas ke ni pli engaĝiĝu kaj fieru pri ili. Esperplene salutas vin ĉiujn,

Julián Hernández Angulo
1996.01.05

# Alvoko al arta kreado

Inter la plej rimarkindaj atingoj de la vere brile sukcesa 2a Kongreso de nia Asocio, nepras mencii la interkonsenton kiun subskribis Flandra E-Ligo, la Fremdlingva Eldonejo "José Martí" kaj KEA por eldonado en kunlaboro de kubaj beletraj verkoj en Esperanto, estu ili originalaj aŭ tradukaj.

Post 17 jara historio -kiun almenaŭ mi fieras nomi elstara-, en kies paĝoj jam enskribiĝis **du Naciaj Kongresoj, Internacia Konferenco por evoluo de nia lingvo en Latinameriko** kaj ankaŭ **Universala Kongreso**, mi firme kredas ke estas tempo por ke niaj beletristoj diskonigu tion kion ili faris kaj faras. Tial, mi invitas ĉiujn niajn verkistojn kaj tradukistojn kontribui per ne gravas kiu ajn beletra genro al tiu agado, tiel ke ni havu kiel eble plej baldaŭ la bezonatajn materialojn por eldonado de unu aŭ -kial ne?- pluraj libroj kiuj kontribuu al la pliriĉigo de la E-kulturo.

Ni neniam forgesu ke beletro ludis, ludas kaj tutcerte en la estonteco ankaŭ ludos gravegan rolon por la lingvo, ĉar ĝi ĉiam pruvos kiom taŭga estas Esperanto por esprimado de homaj sentoj. Zamenhof mem insiste parolis pri tio kaj donis sekvindan ekzemplon pere de liaj tradukoj kaj originalaj verkoj.

Miaopinie, jam estas tempo ke ni pruvu per faktoj kiom matura estas la kuba esperantistaro. Aperigo de pluraj tradukitaj verkoj, du originalaĵoj, atingo de premio en la **Belartaj Konkursoj de UEA** kaj regula publikigo de artikoloj en diversaj revuoj ne sufiĉas. Ili nur povas esti instigo pluvoji.

Viajn kontribuojn en originalo kaj kopio, vi povas sendi al: **Juan Lázaro Besada, Gervasio #62, 2do piso, apto. 3, e/ Lagunas y San Lázaro, C.P.: 10200, Habana 2, Ciudad de La Habana.**

Ju pli baldaŭ ni ricevos viajn kunlaboraĵojn, des pli rapide ni povos pretigi la aperigon de verkoj. Memoru ke ni laboras por komuna celo kaj ĉiu ero sukcesigos la komunan konstruaĵon.

Juan Lázaro Besada Toledo
Komisiito por Atento al Verkistoj

# Havano vokas

| HORO UTC | M | KHZ | REGIONO |
|---|---|---|---|
| 7.00 | 31 | 9820 | Okcidenta, Norda Ameriko kaj Pacifika Azio |
| 15.00 | 25 | 11760 | Tuta Ameriko kaj Karibio |
| 19.30 | 21 | 13715 | Eúropo kaj Mediteraneo |
| 22.00 | 21 | 13715 | Eúropo kaj Mediteraneo |
| 23.30 | 25 | 11760 | Tuta Ameriko kaj Karibio |
| | 25 | 11875 | |
| | 49 | 6070 | |

La fakto ke la e-elsendoj en Radio Havano jam sepjariĝis estas ĝojiga por ni, tial ke tiamaniere nia Asocio posedas unikan komunikilon al la ekstera mondo.

Ĉi jare, RHK festas sian 35-an datrevenon ĝuste la 1-an de majo. Temas jà pri grava radiostacio enlande pro la elstara kaj grava laboro de ĝi plenumata kiel diskoniĝilo de la kuba realo. Ĝi elsendas en 9 lingvoj al ĉiuj mondpartoj.

Esperanto eniris la radiomondon en Kubo en 1989 kaj tiamaniere apartenas jam al la historio de Radio Havano Kubo. Nia redakcio ne volas preteratenti tiun ĉi gravan datrevenon kaj dankas al la radiostacio pro la laboro farita kaj pro la ĝojo per ĝi donita al la E-komunumo tra la mondo!



**Maritza Gutiérrez**
RHK-redaktorino

RILATE AL "KIAL HOMOJ KABEIĜAS" (AVANCO 1/95)

# Agu, ne ploru!

*Norberto Diaz Guevara*

Post plurfoja legado de la komentario "Kial homoj kabeiĝas?", far S-ro Juan Lázaro Besada, ĉefa demando ŝvebas en mia kapo: Ĉu la aŭtoro celas krei ian elitan organizon de esperantistoj? Certe la frazo "malbenita aro da eternaj komencantoj" ŝokas min, ĝuste ĉar ni ĉiuj iam estis komencantoj kaj se ni ne restis eterne tiaj estis pro niaj strebo kaj penado.

Ni esperantistoj ne rajtas forgesi ke nia strategio al fina venko celas esperantigi -ĉu útopie, ĉu praktike, nun ne gravas- la tutan homaron, kiun konsistigas benitaj kaj ne tiom benitaj individuoj, sed simple homoj. Do, tiuj eternaj komencantoj estas ja parto de Esperantio.

La avantaĝoj de Esperanto p l i malpli sukcese montriĝas kaj se homoj kabeiĝas ni serĉu la kialon en tio ke ili eble sidante atendas ion de Esperanto. Ni konsciu ke la Naturo donas al ni vivon, sed ne manieron vivi.

Vere kulturavidaj homoj nepre aktive restos en la movado, eĉ malgraŭ malfavoraj lokaj kondiĉoj por lernado de la lingvo kaj forta alproksimiĝo al ĝia kultura kampo. Realaj ekzemploj troveblas en pluraj filioj de Kuba Esperanto-Asocio.

Kiu kulpas pri la hispanlingva babilado en E-renkontiĝoj? La babilantoj mem, kompreneble! Ĉu la polico kulpas pro la oficiale malpermesataj fiaj agadoj de malbenitaj landanoj?

La hodiaŭa vivo estas ja malfacila, li pravas. Kaj bedaŭrinde, Esperanto ne estas maniero vivi, almenaŭ en nia lando. Tamen, mi petas al tiuj jusbakitaj esperantistoj ne simple sopiri, sed ekagi en la kultura kampo de Esperantio. Mi firme kredas ke pluraj kompetentaj talentuloj volonte helpos ilin, ne nur ekde lingva vidpunkto.

Esperanto donos al ni tiom kiom ni kapablos perlabori. Ni ne ploru; ni agu, por ke Esperanto pluvivu!

2A NACIA KONGRESO

13A KOMITAT-KUNSIDO

# Sukcesoplenaj

*Alexis Otero Castellón*

Dum tri tagoj (7/9a de marto), 100 kubanoj k. 13 vizitantoj: 2 el Belgio, 6 el Germanio, 3 el Nederlando kaj po unu el Britio kaj Usono, ĝuegis la okazigon en Havano de evento neforgesebla. Temis pri la 2-a **Nacia Kongreso de KEA.**

La varia kaj riĉenhava programo havis sep prelegojn, ses rondajn tablojn kaj du praktikajn lecionojn, kies temoj ligitis al precipaj demandoj de la kuba esperantistaro kaj ankaŭ, al temoj koncernantaj gravajn aspektojn de E-o kiel lingvo kaj kulturo.

Samtempe, efektiviĝis paralelaj aranĝoj, el kiuj plej imponis: omaĝo okaze de l'Internacia Tago de la virino, vizito tra la kongresejo (tre grava, ĉar temis pri la Muzeo de Sciencoj Dro Carlos J. Finlay), traurba promenado, libro-aŭkcio, lanĉo de **Avanco**, kvizo pri la E-movado, praktika sesio de Jumeihoterapio kaj landaj interregionaj renkontiĝoj.

Alia grava aranĝo en la kadro de la Kongreso estis la konkurso pri deklamado, kio arigis la tutan kongresanaron kaj kies rezultoj emociigis konkursintojn kaj spektintojn. La unuan lokon gajnis -dividite- **S-ino Mayra Núñez** k. **S-ro Pedro Peña**, el Havano (CHA) kaj Santiago de Kubo ( S C U ), respektive. La duan kaj trian lokojn gajnis reprezentintoj de SCU: **Julio César Tamayo** kaj **María Luz Moya**, tiuorde. Prezentiĝis entute 16 konkursantoj, el kiuj nur 14 fakte konkursis.

Ero tre atendita estis la elektoj al la Nacia Estraro, fare de la Komitato. Post baloto, la stabo de K E A por la periodo 1996-99 estas jena: Prezidanto, **Julián Hernández**; Generala Sekretario, **Maritza Gutiérrez**; Estraranoj: pri Financoj, **Alberto G. Rodríguez**; Instruado, **Héctor Jiménez**; Kulturo, **Pedro Fernández**; Eksteraj Rilatoj, **Juan Ramón Rodríguez**; kaj pri Informado, **Alexis Otero**.

La 2a Kongreso de la kubaj esperantistoj aprobis deklaron pri la perforto de la jurisdikcia teritorio de Kubo (vidu ĝin apude).

Diversaj amaskomunikiloj reeĥis pri la Kongreso.

## LAŬDINDA KOMITAT-KUNSIDO EN HAVANO

Kun partopreno 98%-a de Komitatanoj, efektiviĝis la 13a Komitatkunsido de KEA (marto 5a kaj 6a). En la hotelo Lincoln, de la urbocentro, la membroj de la plej alte supera instanco nia asocia, diskutis detale pri atingoj kaj mankoj de la Asocio la lastan jaron.

Montriĝis ke la asocianaro poiome kresketas, sed ke oni devas flegi multe pli ilian restadon ene de la movado.

Rimarkindan atenton ricevis la fakoj Instruado kaj Informado. La unua ĉar rolas fonton de novaj membroj; la dua, tial ke unu el la prioritatoj de KEA en la tujan estonton fakte estos informado al ekstera publiko, kio pli prestiĝigos niajn agojn kaj publikan bildon, jam aparte prestiĝa.

Endas mencii la aprobon de la buĝeto por ĉi tiu jaro, kaj la okazigon de venonta Komitatkunsido (14a) januare de 1997, en urbo Guantánamo, ĉe la plej orienta ekstremo de la insulo.

Tre laŭdindas la preskaŭ perfekta organizo de la Komitato, fare de teamo sub la bridoj de Manuel Orestes Rodríguez Rábago, postulema Prezidanto de la ĉefurba Filio. Gratulojn al "Manolito" kaj sia helpintaro!

**Alexis Otero Castellón, el Noktuo 2/96 (30a de marto)**

## DEKLARO

Kiel sciate, pasintan 24-an de februaro, avionetoj piratoj flugintaj el Usono perfortis la aeran k. maran spacojn de Kubo. Malgraŭ la avertoj pri tio, fare de la kubaj limgardistoj, kaj la konscio, flanke la pilotoj, ke ili malobservis leĝojn de la Internacia Kodo de la Civila Aviado -la kubajn kaj eĉ la usonajn-, ili emis al persisto en siaj intencoj.

Tial, militaviadiloj de la Revoluciaj Armitaj Fortoj de Kubo ankoraŭfoje strebadis persvadi ilin kaj, antaŭ ĉi obstina sinteno, ili estis faligitaj ene de la jurisdicia teritorio de Respubliko Kubo, koncerne dek du mejlojn elde ĝiaj marbordoj.

Per tiaj piratoj agoj, historie, ili nur portis malbonon kaj semis morton kaj malamon en nia insulo; oni provokis malsanojn, perdon de kompletaj agraj rikoltoj kaj aranĝis krimojn, tiajn kian la eksplodigo -dumfluge- de civila aviadilo transportinta 73 personojn, el kiuj neniu postvivis la atencan agon.

Ĉu tia estas la tipa defendo de la homaj rajtoj kiun oni distrumpetas per la amaskomunikiloj, emisiantaj, pli ol mil horojn semajne, programaron celantan renversi de enen la socian proceson volonte sekvatan de la kuba popolo?

Pro tio: La anaro de Kuba Esperanto-Asocio apogas la firman decidon de nia registaro ne plu toleri la senhonte daŭran perforton de la jurisdiciaj akvo kaj ĉielo de Kubo, far grupoj de la kubdeyena ultradekstrularo de urbo Miami, finance apogitaj de la laŭvicaj usonaj registaroj.

**Subskribite en Havano, la 7-an de marto 1996**

# Ameriko Kongresis en Kostariko

Kiel sciate, de la 12a ĝis la 17a de februaro, okazis en San José, Kostariko, la 3a Amerika Kongreso de Esperanto. Detalojn pri la aranĝo, ni tiras el Cirkulero 7 de la Komisiono pri Amerika Agado, fare de S-ro Atilio Orellana Rojas.

Partoprenis 50 personoj el 17 landoj, el kiuj 11 estis amerikaj. Por unuafojo, estis reprezentitaj landoj kiel Nikaragvo kaj Panamio. (El Kubo ĉeestis S-ro Juan Ramón Rodríguez, Estrarano por Internaciaj kaj Publikaj Rilatoj kaj Komisiito pri Amerika Agado ĉe Kuba Esperanto-Asocio.)

La programo disvolviĝis laŭ la planitaj aksoj: kunsido pri Amerika Agado, Instruado kaj Turismado.

**Amerika Agado:** La kunsido temis pri junularo, instruado kaj regiona agado. En la kazo pri junuloj oni bedaŭras malĉeeston de TEJO-aĝaj homoj, pro tio la partoprenintoj nur povis pridiskuti ĉi tiun temon surbaze de informo sendita de James Rezende.

Rilate al instruado, ĝenerale ĉiuj prezentis sian agadon, kursojn kaj materialojn (la plimulta hispan-parolanta Ameriko uzas ¿Sabe Ud. Esperanto? kaj la vortaron Sopena, elĉerpita en pluraj landoj.

"La kunsido pri regiona agado estis la plej fruktodona (...) ĉar el ĝi fontis multaj proponoj kaj projektoj (...), ekz. eldonado de broŝuro pri Latinamerika fondaĵo (...), instigo al pli forta laboro kadre de ago-tago (...), instigo al LAoj interŝanĝi ties oficialajn organojn (...), starigon de amerika revuo (...)." Aliajn gravajn aspektojn tiurilate, vidu en la Deklaracio de la Kongreso.

**Instruado:** okazis ILEI-Ekzameno, kiun partoprenis 6 kandidatoj, el kiuj 5 sukcesis kaj ankaŭ estis A-Seminario pri Cseh-Metodo kun 4 ĉeestantoj.

**Turismado:** grava vizito al Universitato por la Paco, kie nin gastigis ties rektoro kaj iama prezidanto de Kostariko, S-ro Rodrigo Carazo; ekskursoj al bierfabriko kaj al ĝardeno Lankester.

"Ceteron de la programo plenigis konferenco pri Historio de la argentina muziko (T. ALANIZ), Kial

kaj kiel plialtigi memestimon kaj Kiel esti sukcesa instruisto (Luis Jorge SANTOS MORALES), prezentado de MAZI-filmo (mi) kaj estis 1 ne enprogramita prelego de Félix GARCIA BLAZQUEZ pri gramatiko."

Por nia klerigo ne mankis Nacia kaj Internacia vesperoj kaj piankoncerto de Teresita Alaniz.

Menciindas, fine, la apogon de la lokaj amaskomunikiloj per aperigo de informoj pri la Kongreso, ekspozicio pri E-libroj en la universitata biblioteko, kaj eldono de T-ĉemizo kun E-teksto, fare de Amnestio Internacia. Tre laŭdindas la apogo de la Universitato de Kostariko, specife de la Departemento pri Filologio, la kongresa sidejo.

## DEKLARO DE LA 3A AMERIKA KONGRESO DE ESPERANTO

La partoprenantoj el 17 landoj, kunvenintaj en San José (Kostariko), de la 12-a ĝis la 17-a de februaro 1996, kadre de la 3a Amerika Kongreso de E-o;

**DISKUTINTE** la kongresan temon ("Esperanto kaj la rilatoj inter nordo kaj sudo");

**KONSTATINTE** la problemojn, kiujn nia agado por E-o alfrontas en la kontinento, kaj kun la celo al plia kunordigado de la laboro en la tuta Ameriko;

REKOMENDAS al la amerikaj Landaj Asocioj jenon:

-Nomi Komisiiton pri Amerika Agado ene de ties estraro cele al reprezentado de la amerikaj landoj en la komitato pri AA;
-Daŭre kontribui, per artikoloj, al la informa revuo pri Ameriko, lanĉota aprile de 1996, pere de Internet, sub la respondeco de la Universitato de Kostariko;
-Pli efike, diskonigi la ekziston de Fondaĵo Ameriko de UEA, kies nomo de nun estu Latinamerika Fondaĵo;
-Subteni la fondaĵon finance, kaj proponi projektojn celantajn la diskonigon de E-o en la kontinento.

**KROME**: La Kongreso decidis daŭrigi la serion de kontinentaj aranĝoj, kun trijara periodeco, sub la nomo Tutamerika Kongreso. Tiurilate, la venonta okazos en Bogoto (Kolombio) en la jaro 1999.

Subskribita en San José, la 17an de februaro 1996.

# KEA ORGANIZOS LA 5AN NACIAN SEMINARION

Post analizo, fare de la Nacia Estraro (NE), pri propono de Héctor Jiménez, estrarano pri Instruado, oni venis al la konkludo ke la ĉi jara Nacia Seminario por Instruantoj okazos inter la 4-a kaj la 6-a de julio. Partoprenos 16 personoj el la jenaj filioj: po 1 el Quivicán, P. Betancourt, S. Spíritus, Camagüey, Sto. Domingo, Morón, Tunas, Guantánamo kaj Granma; 3 el Stgo de Kubo k. 4 el la ĉefurbo.

Kiel en antaŭaj Seminarioj, precipaj temoj ligitas al agado de la instruantoj en dumkursaj demandoj: pedagogiaj, psikologiaj, esperantigaj k.a. endaj je rego far la instruanta opo. Ĉiuj estas petataj tuj kontakti la CO-n. konfirmante ĉeeston kaj precizigante nomon de la reprezentonto(j).

## DENOVE DU KUBANOJ EN UK

La NE plezure sciigas la esperantistaron ke KEA reprezentotas de 2 kapa delegacio en la Praga UK (20-27/julio): Manuel O. Rodriguez, prezidanto de filio Urbo Havano, kaj Julián Hernández, prezidanto de Kuba E-Asocio. Pri "Manolito", ni devas diri ke lian partoprenon oni aprobis kaj apogis unuanime. Pravigite de senlaca kaj ege kvalita laboremo; elde lia enpostenigo kiel prezidanto de la provinca filio, konstateblas plian organizitemon ene de la bazo inter aliaj atingoj.

## SUKCESOJN, CENTRA REGIONO!

La 2-a Renkontiĝo de la esperantistoj de la centra reregiono de la insulo, okazos inter la 7a kaj 8a de junio, en Pedro Betancourt, Matanzas. Per telefona kontakto, José de Jesús Campos, prezidanto de la loka filio, konfirmis tion. Dank' al kunordigo serioza far S-roj Norberto Diaz k. José L. Montes (el S. Spíritus kaj Sto. Domingo, respektive) partoprenos reprezentantoj el Villa Clara, Camagüey, Matanzas, C. de Avila k. S. Spíritus. Speciale invititaj: Urbo Havano kaj la Nacia Estraro.

# LIBROFOIRO MALLONGE

Inter la 6a k. la 13a de februaro, KEA partoprenis, per stando, la Libro-Foiron Havano'96. Kune al pluraj kaj internaciaj firmaoj, Esperanto prezentis pli ol 150 librotitolojn (orginaloj k. tradukoj).

La stando ĉiam plenis je scivolema publiko demandinta, inter alio, ĉu E. fine venkos, kiom multaj personoj ĝin parolas, kaj multe pliaj el la kutime aŭdataj internaciskale se temas pri nia, tra la mondo, diaspore disigita gento.

Ni elstarigas la fakton ke en la stando furoris infanlibro; temis pri Aksterisk la gladiatoro, materialo nur ekspoziciita, kiel ĉiuj ceteraj. La deĵorintoj en la esperantistejo librofoira devis labori senhalte pro la intereso vekigita de nia ĉeesto tie.

Unu plian fojon montriĝis la efiko, kiun en la informa kampo plenumas partopreno en tiaj eventoj.

Alexis Otero Castellón

En la lasta eldono (decembro 95), Avanco daŭrigis la publikigon de la Unua Skizo pri Historio de la E-Movado en Kubo. Tie aperis "Rigardo tra kvar jardekoj", enhavanta duan parton de la Unua Periodo, krom Dua kaj Tria periodoj; entute, de 1910 ĝis 1947. Nun, ni historias de 1948 ĝis 1978.

# De KEA al KEA

*Juan Ramón Rodriguez Gómez*

KVARA PERIODO (1948-1957)

## Vigla propaganda laboro

Meze de 1948, fondiĝas Kuba Esperanto-Asocio (KEA), enkapita de D-ro Antonio Alemán Ruiz. Tiu Asocio subtenis tre gravan bultenon (hispanlingva) pri diversaj aspektoj rilate al Esperanto-movado, en- kaj eksterlande. En nia arkivo ekzistas 38 ekzempleroj pri ĝi (ekde sept. 1948 -la unua numero- ĝis julio 1957) kun centoj da informoj tre interesaj.

Ankaŭ gravas la Statutoj de tiu organizaĵo, pri kiu ni havas kopion. Tiuj Statutoj, sendube, estos konsultenda dokumento en la fino de nia historio, kaj kompreneble iam ĝi meritos specialajn komentojn.

Kelkaj ĵurnaloj raportis pri la tiutempa agado; inter ili, **Información**, kaj la revuoj **Carteles** kaj **Bohemia**.

Je la fino de tiu ĉi periodo, kiam Maccartismo svarmis en Usono, la Esperanto-Asocio de Nordameriko (EANA) eksiĝas de UEA, ĉar konsideras tiun lastan kontrolita far komunistoj. En Kubo, Antonio Alemán Ruiz submetiĝas al la pozicio de EANA kaj eksigas Kuban E-Asocion.

La usonaj esperantistoj malaprobintaj la agadlinion de EANA fondas la Esperanto-Ligon de Nordameriko (ELNA) aliĝinta al UEA. En Kubo, Raúl Juárez Sedeño akceptas la postenon de Peranto de UEA (antaŭe okupita de KEA) nialande, en decida kontraŭstaro al la politiko de Alemán Ruiz.

KVINA PERIODO (1958-1973)

# Nova orientigo

Je la fino de la 50-aj jaroj, Alemán Ruiz, en letero adresita al Juárez Sedeño, informas lin pri la nuligo de la esperanta kurso organizita en Havano, pro tuta malĉeesto de la lernantoj. La Jurnalo Información, en la sekció Actividades filatélicas, diskonigas kelkajn esperantajn poŝmarkojn.

En 1962, Juárez Sedeño instruas la lingvon al kelkaj personoj en Camagüey, kiuj de la 14-a ĝis la 21-a de julio 1963 organizas ekspozicion kaj varbas aliajn por fondi la Grupon Esperantistan de Camagüey (1). La 12-an de oktobro 1964, fondiĝas la unua E-Rondo en Ciego de Avila. Pedro Pablo Lamas Díaz, ĝia prezidanto, aranĝas ekspozicion en la biblioteko Roberto Rivas Fraga.(2)

Fine de la 60-aj jaroj, en Havano, oni kreas Komisionon pri Esperanto, kiu aktivas ĝis 1971, "(...) oni instruas la lingvon en Havano kaj en oktobro fondiĝas Havana Esperanto-Grupo, kiu ŝanĝis sian nomon en 1972 al Havana Esperanto-Rondo (....)" (3)

Pri la agado de Havana Esperanto-Grupo kaj de Havana Esperanto-Rondo, ni trovis kelkajn informojn, sed prefereblas lasi la detalojn kaj komentojn por alia okazo. La du preparis kondiĉojn por la sekvanta etapo.

SESA PERIODO (1974-1978)

# Preparkondiĉoj al KEA

Vere, tiu ĉi periodo devus esti parto de la Kvina kaj ne aparta ĉapitro en la Historio de la Esperanto-movado en Kubo, se oni konsideras la mallongecon kaj la malmultajn elementojn trovitajn de ni ĝis nun; sed, tamen, estas fundamenta etapo en la preparo por oficialigi Kuban Esperanto-Asocion, kun diversaj demarŝoj konitaj de ni, kio devas alporti sufiĉajn novajojn. Pro tio, ni preferas trakti ĝin aparte. Mankas kelkaj intervjuoj por diri la lastajn vortojn pri tiu ĉi konsidero.

Estas grave koni ke la 17-an de aúgusto 1974, fondiĝas en Havano, sen registara aprobo, Kuba Esperanto-Asocio (4), kaj kun tio ekkomencas aktiva etapo, ĉefe

de propagando kaj demarŝoj por la oficialigo de **KEA** kaj por plimultigi la internaciajn rilatojn.

En la preparlaboroj de la XI-a Tutmonda Festivalo de la Junularo kaj la Studentoj, Pedro Pablo Lamas, tiama Peranto de UEA en Kubo, sendas cirkuleron al pli ol 20 landoj petante apogon por la ebla partopreno de junaj esperantistoj. La revuo **Esperanto** publikigis anonceton pri tio. (5)

En oktobro 1977, okaze de sia vizito al Havano, la jam forpasinta kamarado Nguyen Van King esprimis sian deziron renkontiĝi kun kubaj sperantistoj. La renkontiĝo okazis en la sidejo de la Kuba Pac-Movado kaj, pro ĝia graveco, vigligis la movadan aktivadon. (6)

Dum la Festivalo (en julio 1978), kelkaj esperantistoj el okcidentaj landoj kaj havanaj esperantistoj aranĝis aktivecon kie la IL ludis sian rolon. (7)

Momente, ni ne aldonos aliajn konsiderojn. Estas prefereble atendi por la estontaj rezultoj de nia serĉado.

**(Proksimajn numerojn, ni daŭre aperigos la Unuan Skizon historian de la E-movado en Kubo. Unu plian fojon, ni invitas vin elverŝi opiniojn pri la temo. Se vi deziras la tutan Skizon, mendu ĝin al Libroservo de KEA kontraŭ 3.00 CUP aŭ 3.00 USD. Tiu teksto aperis kiel broŝuro, sub la titolo** La Esperanto-Movado en Kubo, **kadre de la 2a Nacia Kongreso de nia Asocio, en marto 1996.)**

## NOTOJ

**En tiu ĉi parto, krom Esperanton, ni uzas -metodologie- la internacian kodon por sciencaj skribaĵoj (en la Latina lingvo).**

1 **Persona arkivo de Pedro P. Lamas.**

2 **Idem.**

3 Alberto Fernández-Calienes: **Notoj pri historio de la Esperanto Movado en Kubo (1904-1983), p. 9.**

4 **Idem.**

5 **Ibid., pp. 9-10.**

6 **Idem.**

7 **Ibid., p. 10.**

# Deziras korespondi

Mayra Núñez Hernández
Profesorino de Esperanto por infanoj. Interesiĝas pri kontaktoj kun personoj havantaj sperton en la pedagogia fako, speciale ligataj al la personetoj. Adreso: Luis Estévez # 664 e/ Goss y Pasaje Oeste, Stos Suárez, 10 500, La Habana, Cuba.

María Jesús Méndez Méndez
27-jara administrantino kaj mododesegnistino. Korespondadus pri ekonomio, lingvoj, psikologio, astrologio, filozofio, vojaĝoj kaj artoj ĝenerale. Adreso: Platanal a Desamparados, Edif. Plades, PH, La Candelaria Norte, Caracas 1011-A, Venezuelo.

Frances Rosa Rodríguez
Jus komencis lerni Esperanton k. dezirus praktiki la lingvon. Adreso: H.C. 01, Apartado 6116 Juncos, 00777 Puerto Rico.

José Augusto Rodrigues Pereira
Atendas proponojn pri temoj. Adreso: Rua Cambaúba 200/201 -JG- Ilha do Governador, RJ 21 940-000, Brazilo.

Mara Timermane
35 jara s-ino, fakas pri biologio. Interesiĝas pri turismo, naturkuracado, etnografio, naturo, kulturo kaj sendependa disvastigado de nutrajproduktoj kaj kosmetiko. Adr: Kr. Valdemara 145/1-32 Riga, LV-1013 Latvio.

Luit Staghouwer
Adreso: Julienalaan 25, 9781 ED Bedum, Nederlando.

Ivica Ŝĉepanoviĉ-Truto
Ŝatas kuban plumamik(-in)on, popolajn morojn, fotadon, kolekti monerojn, legi kaj vojaĝi. Adreso: G. Humac, HR 21424, Praĵnica, Kroatio.

Luda Nazaruk
13-jara studentino. Volas koresp. pri lernado, muziko k. vojaĝoj. Adreso: ul.M.Jukova 8b-5, RU-626440, NIJNEVARTOVSK, Siberio, Rusio.

Joel López Hernández
17-jara E-lernanto, laboristo de la Centra Oficejo de KEA. Leterus pri kiu ajn temo. Adreso: Vista Alegre 260 (bajos) e/ J.B. Zayas y L. Caballero, Víbora 10 500, La Habana, Cuba.

Ciferecigis: Javier Ramos
@Radioamatoro